

Eltuniziaj kronikoj (1)

Ĉestrate tio sunklaras: ĉe Tunizio la revolucio ĵus ekkomenciĝas

La avenuo Habib Burguiba estas svarmejo. Ĉiuflanke diskutorondoj. El la ŝtuparo de la Nacia Teatro la laŭtparolilo pasas el mano al mano. Oni parolas, oni krias, oni esprimas libere, ke la revolucio nepre daŭrigu.



Kamaradino M. Mehdi de SNAPAP antaŭ la pordo de la Nacia Teatro en Tunizo

Ben Alí ne foriris: restas lia politika polico, nun kaŝmaskita, kiu daŭre funkcias, restas lia koruptaĵa reto, restas liaj homoj de la RCD, nun maskita per diversaj partioj, kiuj pretaŭ reiri ĝis la povo, kiun ili neniam forlasis, je la oportuna momento.


La alvokojn al la “**Kasbaho 3a**” oni ripetas, oni disvastigas, oni diskutas ĉestrate. Tio estas la respondo al la parolado de la nova ĉefministro Sebsi, kiu parolas per la aroganteco de la povo kaj per laŭrajteco, kiun la popolo ne donis al li. Kaj la strato respondas al li. Ĝi asertas,

ke ĝi ĉeestas kaj vivas kaj ke ĝi ne submetiĝos facilanime al “normaleco”, kiu rezultigas neniun realan ŝanĝon ĉe la tunizia socio.

El ĉiuj anguloj de la marĝenejo kaj la forigo, el Sidi Bouzid, Rdayef, Thala, Kasserine... kaj disvastiĝante sur la tuta lando la tunezia popolo surstrate faradis la revolucion de la digno. Neniu oficejo, neniŭ kaŝita povo, neniŭ partio, neniŭ desegnis la programon. Estas la tunizia popolo mem, kiu ekfaras sian propran historion ne per jazmenfloroj sed per la digno kaj la sango el siaj junuloj, el siaj martiroj.

La **Kasbaho 1a**, la revolucia karavano, miloj da homoj alvenintaj el la plej marĝenigitaj regionoj de Tunizio, el la tuta lando, okupaciis la Registraran Placon ĉe la Kasbaho ekde la dimanĉo 23a de januaro ĝis la 28a, kiam ili estis sovaĝe forigitaj. Ili ne konsentis registaron, kies plejmultaj membroj estis anoj de la partio de Ben Alí, unuagrade ĝia ĉefministro Ghanouchi.

Kaj per la **Kasbaho 2a** falis Gha-



Ekas la subpremado kaj la kuroj



Vundito zorgita de la manifestaciantoj

nouchi. Ili faligis jam du registarojn post la falo de la diktatoro. La tunizia popolo plian fojon faris paŝon antaŭen, ĝi disigis la apogon de la Eŭropa Unio kaj Usono al la Ghanouchia registaro. Oni senoficigis la ĉefajn poliestrojn de la Ben Alia tempo, oni liberigis la politikajn prizonulojn, la RCD estas disigita, sed la strato deziras plu. La kontraŭrevolucio ankoraŭ vivas.

1an de aprilo. La alvoko al la Kasbaho 3a kunigis plurajn milojn da homoj. Ne eblas atingi la placon. Policanoj kaj militistoj regas la enire-

jojn. Ankaŭ la armeo ĉeestas surstrate. Tankoj, kamionoj. Ĉe la alirstrato al la placo pluraj policanvicoj elĵetas sian spiraĉon sur la unuaj vicoj de manifestaciantoj. Improvizaj paroladoj inter la homoj. Meher, junulo stimulantanta la diskutojn, parolas pri la revolucio, pri tio, ke la murdistoj estas ankoraŭ nepunitaj kaj la koruptuloj liberaj. Li deziras realajn ŝanĝojn, detruiri la tutan maŝinaron de la partio-ŝtato, tio estas, alian Tunizion. Li malfidas partiojn kaj sindikatojn. Li scias, ke la forton havas ili ĉestrate.

Subite la homamaso ekmoviĝas. Iuj malantaŭeniras, la plejmulto antaŭeniras al la polico. Ŝajne tiu ĉi komencis ataki, ekas la puŝoj, la batoj, la flugantaj ŝtonoj, la el-tiro de pavimŝtonoj kaj la aero pleniĝas per larmiga gaso, kiuj okazigas la disigon al la medicinstratoj.

Sed la gasoj persekutas nin tra la stratoj. Kamaradino de ĜKL falas svene. Sed ĉi tie estas la popolo. El la domoj eliras virinoj, viroj, infanoj, por prizorgi la vundulinojn. Lakton, citronon, litkovrilojn, ĉion. Junulino alportas *Ventolin*-on por la kamaradino. Respektokisojn sur la frunto. Popola amo kaj solidaro. Plia kamarado de *Solidaires* restis izolata kaj estis atingata de la gasoj. La saman respondon. Tuje akceptita ĉe domo por zorgi lin kaj eviti lian areston. Ĉirkaŭ dudek arestitoj, oni diras al ni.

Poste la homoj alvenas al la avenuo Habib Burguiba kaj denove manifestacias antaŭ la Nacia Teatro. Oni diskutas, oni debatas. Juna studentino alparolas nin kun sento esti ĉefrolulo de tio okazanta. Ŝi repuŝas la senĉesan sinintrudon de la okcidento en sia lando, nian superecosenton, ŝi parolas pri iu Tunizio tolerema, kapabla kunvivi, konstrui malsimilan kaj pli realan demokration ol tiu nia. Ni vidas en ŝi konvinkemon, memfidon. Ŝi estas la bildo pri popolo, kiu ekorganiziĝas, kiu havas esperon kaj



Manifestacio je la 1a de aprilo



La popolo sin esprimas libere

kapablon konstrui kaj antaŭeniri.

La senlaboraj diplomatuloj stariĝis kaj organiziĝis. Dum nur du monatoj ili arigas 45.000 senlaborulojn per strukturoj elsube konstruitaj. La komitatoj pri savo de la revolucio estas ĉie kun funkciado pli fermita (kunordigado de organizoj) aŭ pli malfermita (assemblea), ili funkciigas praktike multajn municipojn. Okazos gravaj mobilizoj kontraŭ la nuna registaro, se oni ne malmuntas la malnovan povmaŝinaron kaj se oni ne enprizonigas la responsulojn pri la murdoj plenumitaj dum la revolucia proceso.

La diskutoj de la konsilioj, kiuj ellaboras la konstituciajn ŝanĝojn kaj pretigas la balotojn, provizore alvokitaj por la 25a de julio, la bataloj kaj partiemaj aliancoj sin sekvas unu la alian. La situacio malfacilas. Multaj estas la intereso, dezirantaj bremsi la proceson aŭ utiligi ĝin.

Sed ĉestrategie tio sunklaras: Ĉe Tunizio la revolucio ĵus ekkomenciĝas

Mouatamid y M.H.

[Laborgrupo pri la Afrika Nordo](#) de la Sekretariaro pri Internaciaj Rilatoj de la Hispana ĜKL

Secretaría de Relaciones Internacionales de la CGT: *Crónicas desde Túnez (1)*. Rojo y Negro Digital, 7 de abril de 2011.

<http://www.rojoynegro.info/articulo/sin-fronteras/cronicas-tunez-1-la-calle-lo-tiene-claro-la-revolucion-acaba-empezar>

Esperantigita de Jurgo Alkasaro

